# ESPERANTO-LYON

**Januaro 2024**

**Permanence et bibliothèque :**
Maison des Associations 7, rue Major-Martin LYON 1er - M° Hôtel de ville - chaque mercredi de 17h30 à 20 H
Crédit Mutuel Lyon République, 12 rue de la République, 69002 Lyon - n° de compte 00020814001
**Contacts : 07 69 29 82 97** – esperantoliono@gmail.com
**Site Internet** : https://esperantolyon.org - www.esperanto-france.org




## ❋ ***Calendrier de Espéranto-Lyon*** :

### Stage de l'Esperanto :

L'Association Espéranto Lyon est heureuse d'annoncer son premier événement public de 2024 ! Il est pensé pour tous ceux qui souhaitent plonger dans le monde fascinant de l'Espéranto : un stage linguistique spécialement dédié aux grands débutants !

Dans cet esprit, nous organisons un nouveau stage linguistique pour débutants en février. Le succès du précédent stage organisé par Andréa nous encourage à continuer sur cette voie. Plus d'informations ici : https://esperantolyon.org/2024/01/01/rejoignez-notre-stage-linguistique-desperanto-pour-debutants-a-lyon/

**Date** : Samedi 3 février 2024
**Heure** : De 10h à 18h
**Lieu :** Escale Lyonnaise, 100 Rue de Créqui, 69006 Lyon

Ce stage est gratuit pour les adhérents d'Espéranto Lyon et une participation aux frais d'organisation de 20€ sera demandée pour les non-membres.

**À propos de l'Association Espéranto Lyon :** Nous ne sommes pas la seule association dédiée à l'Espéranto dans Lyon ! Notre association en particulier est cependant l'une des plus anciennes. Nous formons une communauté dynamique dédiée à la promotion de l'Espéranto à Lyon et dans ses environs. Rejoignez-nous pour apprendre, pratiquer et célébrer cette langue unique !

### 🕮 Lionaj eminentuloj kaj esperanto :

En la komenco, Esperanto interesiĝis la tuta socio. Viroj (ĉefe !), laŭ iliaj kampoj de kompetenco, propagandis por tiu nova ilo. Ekzemple André Michelin skribis ke esperanto povas esti bonefika por industrio kaj komerco, Henri Barbusse por literaturo, André Allix por edukado.
Urbestroj montris sian intereson por nia lingvo. En 1935, Lazare Goujon prezidis la unuan kurson de la jaro. Herriot prezidis la bankedon de la kongreso en 1911….
Sed aliaj lionaj eminentuloj konstruis internacian famon.
La Fratoj Lumière, kiujn ĉiuj konas, sed ankaŭ Justin Godard aŭ Edmond Locard.

Edmond Locard naskiĝis en 1877 kaj kiam li estis 17-a, li povis paroli 17 lingvojn….(mi dubas , sed mi trovis la informon sur la reto !!!!)
Por li, esperanto estis necesa por serĉi internaciajn krimulojn en la tuta mondo. En 1923, en Vieno (Austrio) kun aliaj juristoj, justicofocistoj kaj policistoj, li kreis tion, kio iĝis Interpol.
Eble li ne parolis Esperanton, sed li subtenis la movadon. Ekzemple, li estis membro de la Ligo de Esperantistaj policistoj. Li prezidis kongresojn aŭ prelegis.
Samtempe, li estis fervora adepto de liona kulturo : li konis la historion de Ginjolo kaj la folkloron.

Nun, Justin Godard naskiĝis en 1871. Li studis juron kaj li fariĝis agema politikisto en la sociala kampo en Liono, en Francio kaj la tuta mondo. Unu de lia zorgo estis la virinoj/la infanoj kaj laboro.
Fino de 1918 li kreis la Ligon kontraŭ Kancero.
Kiel Locard, li estis vera lionano…Li skribis « la Plaisante Sagesse Lyonnaise » inter aliajn, kaj legacis sian kolekton al Muzeo Gadagne.

La nomoj de la stratoj indikas la popularecon de la homoj…Ambaŭ Locard kaj Godard havas nun stratojn en la urbo !!!!
*Raportis Pascale Voldoire*

## 🕮 Informo pri Lingvo Internacia :

« Eltirita el la Artikolo de H. MUFFANG, kiu aperis en LINGVO INTERNACIA paĝo 321 jaro 1907 - sub la titolo: Por la Historio de la Lingvo Internacia ĉar « Kompreni » estas Liona gazeto, eble estas interese por niaj legantoj scii ke Maupertuis, fame konata geometriisto, kiu naskiĝis en Saint-Malo (1698-1759), eldonigis siajn verkojn en Lyon. En la 3a volumo paĝo 467, Lyon 1756 oni trovas interesan artikolon sub la titolo: Dissertation sur les différents moyens dont les hommes se sont servis pour exprimer leurs idées (Disertacio pri la diversaj rimedoj, kiujn uzis la homoj por esprimi siajn ideojn). Mi kredas, ke tiu ĉi teksto estas neniam citita, kvankam tre interesa. Nek ĉe Leibnitz, nek ĉe Descartes, nek ĉe iu ajn alia verkisto estas tiel precize, tiel guste esprimita la programo de praktika uzebla internacia lingvo tia, kian efektivigis nia Majstro Dro Zamenhof.

Jen estas la traduko de tiu teksto presita en 1756 :

Se ĉiuj substantivoj havus saman finiĝon; se nur la nombro kaj la kazo (ĉar la gramatika sekso estas tute neutila) estus signataj per kelkaj ĉiam samaj literoj, kiuj anstataŭus la deklinaciojn; se oni donus ĉiam saman finiĝon al ĉiuj adjektivoj, alian al la adverboj; se ĉiuj verboj simile finiĝantaj, havus nur infinitivon ŝanĝeblan per diversaj literoj, kiuj montrus la tempojn kaj la modojn unuforme kaj universale; se, mi diras, troviĝus tia lingvo, ĉiuj gramatikaj reguloj, tiel multaj kaj malfacilaj malgrandiĝus preskaŭ ĝis nenio; ĉiuj vortoj, kies speco estus tuj konata per la finiĝo, estus facile lerneblaj, aŭ trovataj en la vortaro kaj uzataj sen ia ajn malfaciloj ĉu por klarigi, ĉu por kompreni. Nedube estas, ke tia lingvo estus nekompareble pli facile lernebla ol ĉiuj niaj lingvoj. Per malmultaj reguloj, kiujn oni lernus en unu horo da laboro, kaj per bona vortaro oni povus perfekte kompreni ĉiujn verkojn skribitajn per tiu lingvo, kaj skribi en tiu lingvo ĉion, kion oni volus komprenigi al aliaj homoj. »

Originala teksto de Maupertuis, franclingve:

https://fr.m.wikisource.org/wiki/Dissertation_sur_les_diff%C3%A9rents_moyens_dont_les_hommes_se_sont_servis_pour_exprimer_leurs_id%C3%A9es

## 🕮 Gramatiko, PMEG :

Ne Oficiala Vorteto : *Na*

*Na* estas eksperimenta rolvorteto, kiu montras rektan objekton. La intenco estas, ke oni uzu *na* en tiaj okazoj, en kiuj estas malfacile, nekonvene aŭ eĉ neeble uzi la ordinaran objektan finaĵon N. Tiuj, kiuj uzas *na*, uzas ĝin precipe antaŭ ne-Esperantaj propraj nomoj kaj alispecaj fremdaj vortoj. Oni uzas *na* ankaŭ antaŭ mallongigoj, citaĵoj kaj Esperantaj vortetoj, kiuj ne akceptas N-finaĵon: *Por tekstoredaktado Unikode kaŭ Esperante, mi rekomendas na UniRed.* *Multaj jam konas na babilejo.org.* *Tion mi konfirmis konsultante na PIV.* *La ĉina nomo de Esperanto signifas na "mondlingvo".* *Mi ŝatas na ambaŭ.* *Tiom da homoj faras na tiom da strangaĵoj.* *Na pli da informoj oni povas trovi tie.* La precizaj manieroj uzi *na* tre varias. Ĉiuokaze *na* estas reformpropono evitenda. Komparu kun simila uzo de *je*.
Fonto: PMEG
https://bertilow.com/pmeg/gramatiko/neoficialaj_vortetoj.html#j-tjs

## 🗇 *KOTOPO rendevuo :*

*« Kiel vi? », la monata rendevuo por babili en esperanto kaj informi scivolemulojn pri nia lingvo daŭre okazas en KoToPo ĉiun lastan mardon. La skipo de KoToPo ŝatus scii ĉu venus pli da esperantistoj se tiuj renkontiĝoj komenciĝus je la 19a horo anstataŭ la 20a. Por tion indiki, bonvolu skribi al :* ***info@kotopo.net*** **.**
*De tiu-ĉi jaro, eblas aliĝi ankaŭ rete al "Mille et une langues", la asocio kiu estras KoToPo. Uzanto-membro: libera prezo ekde 4 €, solidara membro: libera prezo ekde 40 €*
*La programo kaj ĉiuj informoj pri la asocio troveblas ĉe* ***www.kotopo.net*** *kaj la paĝo Facebook.*

## 🗐 **Forsman** (Lars), professeur de langues.

"Svenska Dagbladet", 15.11.1991"
---------- version française ----------
*Comme professeur de langues, j'étais très sceptique à propos de l'**espéranto** jusqu'à ce que je me trouve, il y a quelques années, devant un groupe de professeurs d'**espéranto** afin de faire une conférence sur la pédagogie des langues. Je constatais alors que cette langue que l'on dit "artificielle" était utilisée avec élégance par les participants entre eux et aujourd'hui -- après avoir été professeur depuis quatre ans à l'École Supérieure Populaire de Karlskoga, dans la section **Espéranto** --, je sais qu'elle fonctionne aussi bien que toute autre langue.*

## ☺ ☺ **Proverbaro de Lucien Bougois :**

Il n'est pas à prendre (à toucher) avec des pincettes.
- Oni ne tuŝus lin per tenilo (pro malpureco).
- Li estas acidhumora / galhumora (pro kolero).

# ESPERANTO-LYON

**Februaro 2024**

**Permanence et bibliothèque :**
Maison des Associations 7, rue Major-Martin LYON 1er - M° Hôtel de ville - chaque mercredi de 17h30 à 20 H
Crédit Mutuel Lyon République, 12 rue de la République, 69002 Lyon - n° de compte 00020814001
**Contacts : 07 69 29 82 97** – esperantoliono@gmail.com
**Site Internet** : https://esperantolyon.org - www.esperanto-france.org

## ✱ ***Calendrier de Espéranto-Lyon*** :

### ☞ ⇨ Salono Primevère, diffusion :

Notre association participera au **Salon Primevère du 1er au 3 mars 2024**. *C'est un moyen de diffusion de la Langue Internationale Espéranto.* C'est un moment très important ou nous gagnons régulièrement de nouveaux membres. Un besoin urgent de volontaires est nécessaire pour assurer les permanences de deux équipes de deux personnes par jour pendant trois jours, annoncez-vous à Esperanto Lyon 7, rue Major Martin Lyon 1er ou envoyer un message à esperantoliono@gmail.com ou téléphoner au 07 69 29 82 97. *Pour les volontaires, des billets gratuits seront à disposition.*

Pour préparer ce salon, Marc-Olivier et Thierry R. ont échangé leurs pensées sur le document *« Comment répondre aux questions sur l'espéranto ? »* de Marc Levin. Ce document très important permet d'acquérir des bases pour mieux répondre aux questions qui nous sont posées par les visiteurs du salon. *Alors demandez ce document.*

### 📖 📖 Assemblée Générale :

L'Assemblée Générale annuelle de notre association Esperanto Lyon se tiendra ***sous réserve de la disponibilité d'une salle*** à la Maison des Associations 7, rue Major Martin LYON 1er en présentiel et aussi par la WIFI.
Ordre du jour : - Rapport moral de la présidente - Rapport financier du trésorier - Renouvellement des membres du conseil. La présidente et le trésorier souhaitent être remplacés. Questions diverses.
*Vous êtes invités à soumettre vos propositions pour aider le fonctionnement de l'association.*
Participer car le quorum doit être au minimum atteint pour le bon fonctionnement de l'association, Contacter : esperantoliono@gmail.com ou téléphoner au 07 69 29 82 97.

### 📖 📖 Histoire et citation :

Informations collectées par Jean-Pierre Ducloyer et Christian Bertin.
**Cài Yuánpéi** (1868 - 1940), homme d'État chinois. Grand espérantiste et grand défenseur de la Culture et de la démocratie, il apporta une contribution importante au développement de la Culture et de l'éducation en Chine.
*Il importe avant tout de s'en tenir à une langue. L'essai de l'**Espéranto** a été concluant. Il vit, il prospère, il répond à tous les besoins auxquels doit répondre une langue auxiliaire. Assurons le développement de l'**Espéranto**, et de lui seul.*

### ☞ El la libro : Ne tiel, sed tiel ĉi !

**Ne tiel :**
Tiu bubo ŝiris sian pantalonon difekta.
***Sed tiel ĉi !***
*Tiu bubo ŝiris sian pantalonon.*

## 🕮 Esperanto-staĝo en Lyon :

Nia asocio organizis tuttagan staĝon en l'Escale Lyonnaise, kiu situas strato Créqui en la 6a distrikto. Ĝi estas loĝejo por junaj laboristoj kaj disponigas ĉambrojn por prelegoj, seminarioj al asocioj. Estas notinde, ke mi malkrovis tiun lokon danke al brazila Esperantistino, kiu vizitadis nian urbon antaŭ ol iri al Torino pasintan jaron.
(Tiu, kiu volas pli da detaloj pri tiu anekdoto, tiu skribos al mi !).
5 personoj partoprenis en nia staĝo, el kiuj 3 estas membroj de nia asocio. Malgraŭ kelkaj teknikaj problemoj (la "rilato" inter mia komputilo kaj la ekrano disponigita ne estis ĉiam bona), ĉiuj bone laboris de la 10a horo ĝis la 17a. 2 el la partoprenontoj informis min antaŭ la staĝo, pri gramatikaj punktoj, kiuj ili ne bone komprenis kaj post klarigoj kun ekzemploj ili povis trankviliĝi tiurilate.
La staĝantoj parolis Esperanton dum la tago, kaj tio estas grava, ĉar niaj samcivitanoj, kiuj lernas sole per retaj lecionoj ne konscias pri la malfacilaĵoj de la francoj por bone apliki la simplan regulon, t.e. ĉiu litero estu prononcata kaj unu sono por unu litero. La francoj kutimas glui la vokalojn, kiam tiuj ĉi apudas kaj tradicie eraras por prononci "an; en".
La etoso estis amikeca kaj mi prenis tempon por paroli pri la historio de la movado kaj nia asocio kaj ĝiaj trezoroj, kiuj kuŝas sur la bretoj de la ŝkrankoj en nia sidejo.
Mi kaptas la okazon por memorigi al niaj membroj, ke ili estas bonvenaj ĉiumerkrede ekde la 17a kaj 30 por malkovri tiujn trezorojn.
***La venonta staĝo okazos sabaton la 23a de marto en la socia centro strato des Farges 69005 Lyon. Ĝi estos gvidata de Marilou Cochard.***

🗇 *KOTOPO rendevuo :*
*« Kiel vi? », la monata rendevuo por babili en esperanto kaj informi scivolemulojn pri nia lingvo daŭre okazas en KoToPo ĉiun lastan mardon. La skipo de KoToPo ŝatus scii ĉu venus pli da esperantistoj se tiuj renkontiĝoj komenciĝus je la 19a horo anstataŭ la 20a. Por tion indiki, bonvolu skribi al :* ***info@kotopo.net*** **.**

## 🗐 Konstruitaj lingvoj esplorataj en Francio

La dua eldono de la Internacia Simpozio pri Konstruitaj Lingvoj (I-CONLANG 2024) okazos ĉeeste komence de julio 2024 en Orléans (Francio). La ĉi-jara simpozio estas organizata de la Liĝera Lingvistika Laboratorio (LLL, UMR 7270 - Universitato de Orléans, Universitato de Tours, BnF, CNRS). La simpozio temas ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri aliaj konstruitaj lingvoj. La venonta eldono intencas doni al Esperanto la plej gravan rolon. La organiza komitato planas tri sesiojn, kaj la unua fokusiĝos ĉefe pri Esperanto. Ni aparte bonvenigas ĉiujn esperantologojn kaj interlingvistojn kontribui al la programo per proponoj pri Esperanto. Notindas ke krom lingvistika aliro al Esperanto (kaj al aliaj konstruitaj lingvoj), la simpozio bonvenigas prelegojn en aliaj fakoj, ekzemple laŭ la vidpunkto de la diversaj homaj sciencoj (historio, sociologio, psikologio, pedagogio, filozofio, lingvo-politiko, literaturoj kaj artoj, kulturaj studoj, komunikado ktp.). Alvoko pri la simpozio troviĝas ĉe la retpaĝo:
https://icon2024.sciencesconf.org. La oficialaj lingvoj de la simpozio estos la franca kaj la angla. Oni povas sendi preleg-proponojn ĝis la **15-a de februaro 2024** (rekte sur la retpaĝo de la simpozio).
*(Eltiraĵo de EKO 4 - AMO programita por 2024 de Stefan MacGill )*

## ☞ Geonkloj daŭre valoras ĉe <edukado.net>

Tiu programo ligas spertajn esperantistojn kun novuloj. Skribas Katalin : Ni fiere informas, ke nia programo estas ankoraŭ la plej populara kaj utila parto de nia retejo. Ekde ĝia starto en 2016 ĝis la jarfino 2023 niaj geonkloj okazigis 4522 sesiojn. En tiu ĉi jaro la genevoj povis ĝui 514-fojojn helpon. En la plua parto de la teksto vi povas legi kiuj estis la plej diligentaj onkloj kaj kion ni faris dum la pasinta jaro.
Legu pli ĉe la paĝo :
https://edukado.net/novajhoj?id=900
*(Eltiraĵo de EKO 4 - AMO programita por 2024 de Stefan MacGill )*

## ❀❀ El bukedo de anekdotoj :

I. PADEREWSKI (nask. 1860), la mondkonata pola pian-artisto, estinta ĉefministro de Polio, promenis iam en la stratoj de la amerika urbo Bostono. Li iris preter juna ŝu-purigisto, kiu proponis al li sian servon.
La artisto, vidante, ke la vizaĝo de la knabo estas plen-plena de malpuraĵoj, diris al li:
- Mi ne bezonas ŝu-purigon, sed mi donos al vi dudek-kvin cendojn, se vi lavos vian vizaĝon.
- En ordo, - respondis la bubo, kaj kuris tuj al la proksima fontano, por lavi sin.
Post la vizaĝ-puriga operacio Paderewski transdonis la promesitan moneron al la knabo. Sed ĉi-tiu, atente pririgardinte la muzikiston, redonis al li la moneron kaj diris:
- Reprenu, sinjoro, vian monon kaj iru al tondisto, ĉar vi pli multe bezonas tondiĝi ol mi laviĝi.

# ESPERANTO-LYON

**Marto 2024**

**Permanence et bibliothèque :**
Maison des Associations 7, rue Major-Martin LYON 1er - M° Hôtel de ville - chaque mercredi de 17h30 à 20 H
Crédit Mutuel Lyon République, 12 rue de la République, 69002 Lyon - n° de compte 00020814001
**Contacts : 07 69 29 82 97** – esperantoliono@gmail.com
**Site Internet** : https://esperantolyon.org - www.esperanto-france.org



## ✱ ***Calendrier de Espéranto-Lyon*** :

### 🕮 🕮 Assemblée Générale :

L'Assemblée Générale annuelle de notre association Esperanto Lyon se tiendra le 25 mars de 17h à 20h à la Maison des Solidarités, 215, rue Vendôme Lyon 3éme en présentiel et aussi par la WIFI.
Ordre du jour : - Rapport moral de la présidente - Rapport financier du trésorier - Renouvellement des membres du conseil. La présidente et le trésorier souhaitent être remplacés. Questions diverses.
Participer car le quorum doit être au minimum atteint pour le bon fonctionnement de l'association.
*Vous êtes invités à soumettre vos propositions pour aider le fonctionnement de l'association.*

*La conclusion de notre Assemblée Générale sera célébrée par un moment convivial sous forme d'apéritif dînatoire. Dans un esprit de partage et de convivialité, l'association sera heureuse d'offrir des boissons pour l'occasion. Nous encourageons chaleureusement chaque participant à apporter un plat froid à partager pour enrichir un buffet commun.*
*(Annoncez-vous à l'adresse ci-dessous).*
Contacter : esperantoliono@gmail.com ou téléphoner au 07 69 29 82 97.
Connexion le 25 mars à 18h30 par ZOOM - https://us02web.zoom.us/j/86494351453?pwd=dVEyaUhVL1gyL3lFZ0xNU24wa3ZaUT09

*(Si vous ne pouvez pas participer à cette assemblée générale, il est important de* ***remplir un pouvoir****, en pièce jointe lors de l'envoi de la convocation, afin que votre voix puisse être représentée.)*

### ☞ ⇨ Salono Primevère, disvastigado :

- Ni partoprenis en la Salono Primevère. Ni povis renkonti multajn homojn, scivolemajn pri Esperanto. Ni vendis plurajn ekzemplerojn de la libro La Eta Princo. Entute 11 membroj el nia asocio ĉeestis por prizorgi la budon, montrante signifan impeton de nia klubo. Tio spegulas nian deziron agi por Esperanto.

Ni laboris en nia sidejo por estigi nian budon dum Primevère :

☞ Aktivecoj :
- .Thierry, membro de nia asocio, kiu partoprenas en la Esperantaj kursoj en Villeurbanne, korespondas kun Sinjorino MURATA Kazuyo, membro de la ĝemelklubo de Jokohamo. La temoj de ĉi tiu korespondado estas diversaj kaj eblas al li pli lerni pri la japana kulturo.
Ĉi tiu korespondado ankaŭ estas parto de la deziro krei novan dinamikon kun niaj ĝemelaj kluboj.

- Mesaĝo de Regis Fabre : "Mia kartvela edzino, kun mia helpo, organizas vojaĝon al Kartvelio ĉi-jare, de la 25a de majo ĝis la 4a de junio."
Se vi havus demandon, bonvolu uzi la retadreson : tturmanidze@hotmail.com

## 📰 📰 Histoire et citation :

Informations collectées par Jean-Pierre Ducloyer et Christian Bertin.

**Rollet de l'Isle** (),

*L'**espéranto** possède une richesse d'expression bien supérieure à celle de la plus riche des langues existantes ou mortes. Il est facile de la comprendre : la faculté illimitée, mais systématisée, de former des mots par simple juxtaposition d'autres mots, permet d'accroître jusqu'à l'infini les ressources du vocabulaire, d'exprimer les nuances les plus subtiles, de faire naître des sensations intellectuelles nouvelles par la rencontre d'idées connues, mais non encore rapprochées.*

## 📖 Esperanto-staĝo en Lyon :

**Notre association** vous convie à une journée exceptionnelle consacrée à l'apprentissage et à la pratique de l'Espéranto le samedi 23 mars 2024 de 10h à 17h au Centre social de St Just (Salle Équipage), 41, rue des Farges, 69005 Lyon

Que vous soyez novice, faux débutant ou tout simplement désireux d'apprendre les bases de l'Espéranto, ce stage est fait pour vous.

Lien de contact pour vous inscrire à ce stage : https://esperantolyon.org/2024/02/20/un-nouveau-stage-linguistique-a-lyon-le-23-mars-2024/

## 💻 Ĝemelurboj :

La kvinan de marto okazis vespere reta renkontiĝo kun nia ĝemela klubo el Frankfurto.

Tiu renkontiĝo okazos la unuan mardon ĉiumonate.

Feliĉe estus bone ke en aprilo pluraj amikoj en nia membraro partoprenus tiun interŝanĝon.

Bonvolu kontakti Andrea 07 66 13 73 12 aŭ esperantoliono@gmail.com

## 🏝 Rakonto pri naturo :

Grive musicienne = Kantoturdo vivas en variaj arboplantadoj, en parkoj kaj ĝardenoj. La loĝantoj de nordejo migras dum vintre en sudorientan kaj sudan Eŭropon. La francaj loĝantoj travintras surloke. Sufiĉe timema, ĝi nutras sin per helikoj, insektoj, vermoj. Nesto troviĝas en hedero, konifero…

Ĝi estas iomete pli malgranda ol merlo, sufiĉe dikmalalta kun vosto mallonga, bruna supro, blanka malsupro kun nigraj makuloj.

Voĉo « zit » sufiĉe diskreta iom akra, varia sonora kanto tre muzika.

## ☺ ☺ Jen ŝerco:

Iu loĝantino de la ĉirkaŭurbo venas rakonti al la polico-komisaro de sia kvartalo : Mi vidis surterigi flugantan subtason, el kiu eliris tri verdaj hometoj. - Ĉu vi alparolis ilin ? – Jes. - Kaj kion vi diris ? – Mi diris : Ĉu vi ne scias legi ? Vidu tiun aviztabulon ; « Gazono malpermisita ».

*(Ĝi estas de F-ino Gallon, membro de nia asocio siatempe).*

## ✈ UNIVERSALAJ KONGRESOJ :

La 109-a Universala Kongreso okazos en la urbo Aruŝo (Tanzanio) de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024 en la Afrika Kontinento. La Kongresa temo en Aruŝo estos : « Homo, lingvo por pli bona mondo ».

*Tiu renkonto en Afriko ebligos ekscii kiel Esperanto disvastiĝis tie kaj malkovri la ĉiutagajn travivaĵojn.*

Informoj kaj aliĝiloj haveblaj ĉe : Universala Esperanto-Asocio Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando www.uea.org aŭ ĉe Esperanto-France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS info@esperanto-france.org

## ✈ ILEI-Kongreso 2024

La **57-a Internacia iLigo de Instruista kongreso de ILEI** okazos en Brazilo en la turisma urbo Masejo (Maceió) de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2024.

Kongresa temo estas « Esperanto por justa edukado »

## ☺ ☺ Proverbaro de Lucien Bougois :

Il ne peut pas le voir en peinture !

- Li ne povas toleri lian aspekton ! z
- Eĉ lian bildon li ne toleras !

## 🚗 Congrès européen d'espéranto 2024 :

Les Congrès de l'espéranto en France et en Allemagne auront lieu conjointement à Strasbourg, du 8 au 12 mai 2024.

Informoj ĉe Esperanto-France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS info@esperanto-france.org

## ☺ Humoro el Revueto « Juna Amiko »

Du skoltoj demandas vilaĝanon :

« Ĉu ie tie ni povas starigi nian tendon ? »

« Jes, tie sur la herbejo. »

« Kaj ĉu ĉi tie, en la vilaĝo oni povas iel amuziĝi ? »

« Certe, jes. Vespere sur tiun herbejon ni ellasos du virbovojn. »

ESPERANTO LYON

# ESPERANTO-LYON

**Aprilo 2024**

**Permanence et bibliothèque :**
Maison des Associations 7, rue Major-Martin LYON 1er - M° Hôtel de ville - chaque mercredi de 17h30 à 20 H
Crédit Mutuel Lyon République, 12 rue de la République, 69002 Lyon - n° de compte 00020814001
**Contacts : 07 69 29 82 97** – esperantoliono@gmail.com
**Site Internet** : https://esperantolyon.org - www.esperanto-france.org




## ✱ ***Calendrier de Espéranto-Lyon*** :

### Historio :

*Nia amikino Pascale Voldoire raportis ĉi-sube pri tiu René Lemaire sed en nia asocio siatempe pli malfrue estis alia samnoma René Lemaire kiu agis kiel sekretario en « Société Espérantiste de Lyon kaj Centre Espéranto de la Région Lyonnaise ». Dankon al ŝi.*

RENE LEMAIRE (1876-1954)

Li naskiĝis en Reims en 1876. Li havis tre profundan fidon, kaj lia tuta vivo, li servis la katolikan kredon.
Li uzis sian filozofion por helpi la laboristojn, kreante domojn, novajn socialajn regulojn ktp….
Li kreis organizojn aŭ aliĝis al organizoj kiuj ebligis lin propagandi por sia kredo kaj agi. Ekz : « Le Sillon » de Marc Sangnier.

R.Lemaire kaj E°
En 1892, Louis de Beaufront kaj René Lemaire renkontiĝis ĉar ili vivis en la sama regiono.
1893 : R.Lemaire estis deksepjaraĝa kaj komencis propagandi por esperanto.
1898-1902 : De Beaufront fondis la SPPE (Société pour la propagation de l'Esperanto) kaj la revuon l'Espérantiste.
NI HAVAS PLURAJN EKZEMPLEROJN Rue Major Martin en Lyon.
R.Lemaire laboris multe por disvastigi esperanton per l'Espérantiste. Li informas nin pri la novaj kluboj, asocioj, aliĝoj ….En unu vorto, tiu laboro montras la kreskadon de la movado.
Li organizis konkursojn de literaturo en Esperanto.
Li stimulis la interŝanĝojn de postaĵo : inter 1896 ĝis 1903, li ricevis 250 poŝkartojn el Rusio kaj….32 el Europo.
Li prezidis la revuon « Espero Katolika » por Kristanoj. Ekz : iu tradukis preĝon de Lammenais Ekz (ne tro rok'n'roll…).
NI HAVAS ĜIN Rue Major Martin en Lyon….

RL kaj pacifismo :
Esperanto parolas al menso, kaj pacifismo al koro. Tamen, pacifismo kaj Esperanto estas kiel fratoj….ĉar paroli la saman lingvon ebligas kompreni unu la alian….

Ido kaj Esperanto : la lasta batalo.
Ekde 1904, la homoj kiuj subtenas Esperanton kaj Idon, kverelas. En 1907, komitato « délégation pour l'adoption d'une langue auxiliaire », elektas esperanton. Ĝi ne estas perfekta sed preskaŭ perfekta…
Louis de Beaufront ne plu volas labori kun la esperantistoj. Lia revuo l'Esperantiste iĝas « la langue auxiliaire »
R. Lemaire klopodas savi Idon sensukcese !
Konkludo : Esperanto ankoraŭ vivas !

### UEA (Universala Esperanto-Asocio) atingis 4700 individuajn membrojn en 2023 :

La revuo *Esperanto de UEA raportas* ke la Individuaj membroj kreskis kaj atingis 4700, kompare kun 4552 en la antaŭa jaro. Klare, por la nuna jaro, la celo de kvin mil individuaj membroj estas realisma celo. La Fondaĵo Canuto ege laboros kreskigi sian subtenon, sed la kresko venu el pagintaj membroj - la varia kotiztabelo ege kontribuas al tio! Laŭ vere kuraĝa elpaŝo, UEA akceptas membro-pagojn forte diferencigitajn laŭ pagipovo.
La defio" 300 pliaj membroj. La celo: UEA kun kvin mil membroj !

## ✈ UNIVERSALAJ KONGRESOJ :

## UEA-kongreso Aruŝo (Tanzanio)

La 109-a Universala Kongreso okazos en Aruŝo de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto. Jam aliĝis 425 homoj el 54 landoj (ni notu 39 el Francio). Estos tute nova malkovro en alia kontinento. Ni deziru sukcesplenan kongreson. La Kongresa temo en Aruŝo estos : « Homo, lingvo por pli bona mondo ».

Esperanto-Asocio Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando www.uea.org aŭ ĉe Esperanto-France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS info@esperanto-france.org

## Histoire et citation :

Informations collectées par Jean-Pierre Ducloyer et Christian Bertin.

**Feneyrol** (Michel), directeur du Centre National d'Études des Télécommunications.

USTIFY">Extrait de son livre "Des pyramides du pouvoir aux réseaux de savoirs - Tome 1", 1997 ou 1998 :

*La complexité de la société de l'information résulte, on l'a vu, pour une part importante, du foisonnement de techniques et de normes qui la caractérisent, d'où le succès de toutes les tentatives de faire communiquer entre eux équipements et systèmes hétérogènes : le codage numérique, le protocole Internet et bientôt Java, qui est aux logiciels de Microsoft, en informatique, ce que l'**espéranto** est à l'anglais, comme langage universel.*

## Kiel uzi la lingvon ?

La klubo el Frankfurto proponas virtualan renkonton la « 23-an de aprilo ekde la 19-a horo » laŭ la senprograma samideana babila renkontiĝo. Jen la Ligilo:

https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09

Estas okazo havi kontakton kun la ĝemelurba klubo kaj praktiki esperanton.

*KOTOPO rendevuo :*

*« Kiel vi? », la monata rendevuo por babili en esperanto daŭre okazas en KoToPo ĉiun lastan mardon. La skipo de KoToPo ŝatus scii ĉu venus pli da esperantistoj se tiuj renkontiĝoj komenciĝus je la 19a horo anstataŭ la 20a. Por tio, bonvolu skribi al : **info@kotopo.net** .*

## MOMENTON !

Agatha CHRISTIE (1900), la mondfama verkistino de detektivaj romanoj, loĝas dum la plej granda parto de la jaro en Bagdad, kie ŝia edzo faras arkeologiajn esplorojn.

Antaŭ nelonge ŝi diris en unu societo kun granda konvinko :

- La plej bona edzo estas la arkeologo. Ju pli aĝa fariĝas lia edzino, des pli multe li interesiĝas pri ŝi !

## ☺ ☺ Jen ŝerco:

Tiu muzikamanta sinjorino havis edzon kiu komprenis nenion pri la muziko. Ŝi provis eduki lin kaj konduki lin kun si al Operejo, kie li alestis terure tedita. Mi estas certa ke vi nenion komprenis sopiris ŝi post la finaj kantoj. – Sed, Jes, li respondis, mi bone rimarkis ke ili kantis ĉiuj kune por ne maltrafi la lastan metroon.

*(Ĝi estas de F-ino Gallon, membro de nia asocio siatempe).*

## El bukedo da anekdotoj. Momenton !

Nicolas POUSSIN (1594 – 1665)

Estis franca pentristo.

Iam unu riĉega sinjorino montris al li sian pentraĵon kaj petis opinion pri ĝi.

- Sinjorino, - respondis la fama artisto, - ke vi fariĝu lerta pentristino, mankas nenio alia, ol iom da malriĉeco.

## ☺ ☺ Proverbaro de Lucien Bougois :

**Le malheur des uns fait le bonheur des autres** :

- Unu floras, alia ploras ᶻ
- Por malsanulo forto, kokido morto ᶻ
- Por unu - festeno, por alia - ĉagreno ᶻ

## ☺ ☺ Anekdoto : - **La ekkonilo** :

Sinjoro (hejmenreveninte al kuiristino) : Mario, via fianĉo staras antaŭ la pordo kaj atendas vin !

Kuiristino : Ĉu vi konas mian novan fianĉon ?

Sinjoro : Jes, mi ekkonis lin per la cigaro ; mi fumas la saman.

## Congrès européen d'espéranto 2024 :

Les Congrès de l'espéranto en France et en Allemagne auront lieu conjointement à Strasbourg, du 8 au 12 mai 2024.

Informoj ĉe Esperanto-France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS info@esperanto-france.org

# ESPERANTO-LYON

**Majo 2024**

**Permanence et bibliothèque :**
Maison des Associations 7, rue Major-Martin LYON 1er - M° Hôtel de ville - chaque mercredi de 17h30 à 20 H
Crédit Mutuel Lyon République, 12 rue de la République, 69002 Lyon - n° de compte 00020814001
**Contacts : 07 69 29 82 97** – esperantoliono@gmail.com
**Site Internet** : https://esperantolyon.org - www.esperanto-france.org



La olimpia flamo atingos Parizon en julio 2024 laŭ tre diversaj itineroj tra Francio.

Post reflamigo en Grekio de la olimpia flamo, ĝi ekiras al Parizo 2024 portota de multnombraj homoj.



## Esperanto Lyon - asocio :

A/- Nia prezidanto informas vin ke la raporto de nia Ĝenerala Asembleo, kiu okazis antaŭ nelonge, estis oficiale deponita ĉe la prefektejo laŭ la regularoj. Ĉi tiu formalaĵo certigas la leĝecon de niaj agadoj kaj decidoj. Ni dankas ĉiujn membrojn kiuj partoprenis kaj kontribuis al la sukceso de ĉi tiu asembleo. Por pliaj informoj, ne hezitu kontakti nin.

B/- Ni deziras esprimi nian dankon al Adamo, diligenta membro de nia asocio, kiu ĵus vizitis la butikon Equinoxe por preni flugfoliojn de Esperanto France. Ni skribis la retadreson de nia asocio en tiuj flugfolioj. Ili estas poste disdonitaj en diversaj bibliotekoj. Tio estas bona maniero por disvastigi informojn pri Esperanto.
*Grandan dankon al li pro lia agado, kiu, ni esperas, inspiru aliajn membrojn. Unuigante niajn fortojn, ni povos pli vaste kaj regule disvastigi nian lingvon.*

C/- Ni ricevis mesaĝon de sinjoro Gaetano De Venuto, membro de la Esperantista Grupo en Padovo, kiu esploras pri Esperanto-grupoj en urboj ĝemelitaj kun Triesto kaj Udino - inkluzive Vienne. Li serĉas informojn pri la loka Esperanto-grupo, ties prezidanto, ilia telefonnumero kaj retadreso. Se iu havas informojn, bonvolu kontakti nin, ia kunlaboro estas tre ŝatata kaj gravas por fortigi niajn internaciajn rilatojn. Koran dankon pro via helpo.

D/- La Urbodomo de Villeurbanne kune kun La Maison des Solidarités (La domo de la solidarecoj) organizis diskutrondon pri la temo "Internacia Solidareco: Kiel Sukcese Mobilizi Ĉi tie kaj Tie". Ĉi tiu evento okazis mardon, la 30-an de aprilo je la 18:00 ĉe la Domo Berty Albrecht kie nia asocio gvidas kursojn. Tio estis ŝanco por partoprenantoj lerni kaj diskuti kiel efike kontribui al solidarecaj klopodoj lokale kaj internacie.

E/- **Rakonteto pri mia Vojaĝo en Japanio (Marc-Olivier)**

La Sanktejo Gichū-ji, situanta en la urbo Ōtsu (kiu estas en la gubernio de Ŝiga), proksime de Kioto, estas budhana templo. Ĉi tiu loko bonvenigis plurfoje Matsuo Bashō, gravan majstron de hajko, kiu esprimis la deziron, ripozi eterne ĉi-tie, apud la tombo de la landestro Yoshinaka. Admiranto de la hajkoj de Bashō, mi vizitis ĉi tiun Sanktejon dum mia vojaĝo por honori lian memoron.

**Familio kaj Originoj:** Matsuo Bashō, naskiĝinta en 1644 en la provinco Iga el la samuraja familio Matsuo, estis unu el la plej eminentaj poetoj de la japana Edo-periodo.

Matsuo Bashō, naskita Matsuo Kinsaku kaj konata dum plenaĝeco kiel Matsuo Munefusa, naskiĝis en 1644 en Iga-Ueno kaj mortis la 28-an de novembro 1694 en Osako. Li estas granda majstro de tradicia japana hajko.

La familio Matsuo, el kiu li venis, asertis esti anoj de la antikva klera kaj militista Heike-klano, donante al Bashō kulturajn kaj spiritajn influojn, kiuj formis lian arton kaj pensmanieron. Ni povas tamen imagi, ke li ne estis destinita fariĝi poeto.

**Deveno de la Nomo "Bashō":** La poeta nomo "Bashō" (芭蕉), kiu signifas “bananarbo” en la japana, estis adoptita post kiam amiko plantis bananarbon en la ĝardeno de lia provizora loĝejo.

**Influo en la Poetika Mondo:** Bashō estas konsiderata kiel la majstro de la hajko, japana poezia formo konsistanta el tri versoj kun la silaba strukturo 5-7-5. Li esploras la rilaton inter la homa estaĵo kaj la naturo, utiligante la konceptojn de

sabi (sereneco) kaj wabi (simpleco). Laŭ Bashō, hajko superiras la simplecon por aperigi la kaŝitan belecon de etaj momentoj. Ni povas trovi la ideon de "Fueki ryūkō" (不易流行), kiu klarigas la ligon inter la konstanteco kaj la pasema tempo, tiel spegulante profundan aspekton de la japana kulturo.
Mi pensas, ke ni devas grave konsideri lian arton nuntempe. Mi vidas en lia arto solvon por revivigi nian mortintan poezion en Eŭropo.
**Morto kaj Heredaĵo:** Bashō mortis la 28-an de novembro 1694 en Osako pro stomaka malsano, post jaroj da vojaĝado kaj verkado, kiuj ofte minacis lian sanon. Lia lasta poezio estas "Tabi ni yande yume wa kareno wo kakemeguru" (旅に病んで夢は枯野をかけ廻る) — "Migra malsano en vojaĝo, en sonĝo mi travagas nudan kamparon".
Jen traduko de lia plej fama hajkuo:

Olda lageto.
Raneto en ĝi plonĝas,
bruo de plaŭdo.

F/- Esperantisto vizitis nian urbon, kaj venis en mian etan vendejon (de Marc-Olivier)! Li nomiĝas Marso.
Li estas doktoriĝanto en kemia biologio, en Sevilo (hispanio). Li deziras labori por Eŭropa Unio do li lernas la Anglan, la Francan, la Germanan kaj la Esperantan lingvojn! Li esperantistiĝis antaŭ 6 monatoj kaj li jam tre bone parolas esperante ! Ni deziras al li suckeson.

## Prelego :

La prezidanto informas ke nia asocio partoprenos en la "Eŭropa Monato" organizota en Liono. Ni organizos prezenton *jaŭdon la 16-an de majo je la 19-a horo* ĉe *KoToPo 14 rue Leynaud Luon 1er* dank'al la invito kaj la agado de Guillaume kiu administras tiun asocian trinkejon. Kiel vi scias, KoTopo subtenas la disvastigon de Esperanto. La temo de nia evento estos: "Ĉu Esperanto, komuna lingvo por Eŭropo?" Ni diskutos la valoron kaj eblecojn de Esperanto kiel ponto aŭ ligo inter diversaj kulturoj en Eŭropo. Ni esperas vidi vin tie kaj diskuti kune la estontecon de Eŭropo per nia bela lingvo! Vi povas disvastigi tiun inviton.

## ☺ ☺ Proverbaro de Lucien Bougois :

Mieux vaut prévenir que guérir
- Pli facile estas malbonon eviti, ol korekti z

## Partopreno-rilato :

**Andrea Bretrand** partoprenis la gazetaran konferencon organizitan de la asocio Feyzin Europe kun Radio Brume la 2-an de majo.
Krom Esperanto Lyon aliaj asocioj partoprenis :
- **ICAN France**, kiu aktivas kontraŭ nukleaj armiloj,
- **Ukraine 33**; la nombro 33 estas menciita por memorigi, ke de 1932 ĝis 1933, la Respubliko de Ukrainio estis viktimo de terura malsato, kiu kaŭzis la morton de ĉirkaŭ 5 milionoj da loĝantoj pro la volo de Staline,
- **ONE** kies celo estas batali kontraŭ la malriĉegeco en la mondo (legu pliajn informojn ĉe reteja adreso one.org),
- La ligue des droits de l'homme,

Ankaŭ prelegis aktivuloj kadre de Eŭropa Unio :
- Sindikatestro, kiu parolis pri la Eŭropa Sindikata Konfederacio (La Confédération européenne des syndicats (CES)). Tiu Eŭropa sindikato povas iniciati rektan eŭropan direktivon : ekzemple tiu, kiu rilatas al Eŭtopa entreprena konsilio kaj tiu pri gepatraj ferioj,
- Aktivulo por Eŭropa Federacio, kiu ne multe priparolis pri federacio sed pri la necesa partopreno en la eŭropa balotado la 9an de junio.
- Mia parolado kompreneble koncernis la lingvajn problemojn: lingva diskriminacio, la rimedoj por trudi sian gepatran lingvon al aliaj popoloj: ĉu perforte post invado (mi referencis al la verko "La Princo" de Niccolo Machiavelli, kiu priskribas kiel fari por konservi konkeritan teritorion organizante migradon de konkerantoj kaj neniigon de loka kulturo), ĉu per mola potenco, kiu permesis al la angla lingvo iĝi internacia pro ekonomiaj kialoj. Mi ankaŭ parolis pri la mono ŝparota per referenco al la raporto de François Grin, se oni uzos la lingvon Esperanto.
*Daniel Hulas prezidanto de Europe Feyzin kuraĝigas niajn agadojn.*

## ✈ Vojaĝo al Sevilo :

Mi vojaĝis el Bordozo al Sevilo en Hispanio kun familio per aviadilo en marto 2024. Sevilo estas la ĉefurbo de la regiono Andaluzio. Estas belega Urbo. Oranĝarboj staras en la tuta urbo. Ili floras kaj ni sentas iliajn odorojn. Kristoforo Kolumbo forlasis Sevilon kaj atingis Amerikon. Lia tombo staras en la Sevila katedralo. Multaj tre belaj preĝejoj staras en la urbo. *Dankon al Thierry ROUX*